

Numero: 286.
Marto: 2016.

24-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefono: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Migrantoj

Muta milito kontraŭ Eŭropo. Ne eksplodiĝas bomboj, grenadoj. Maŝilpafiloj ne klaketas pafante la etajn vespojn de la morto.

Nun ni travivas novan kruelan militon. Ambaŭflanke estas nur viktimoj. En tiu ĉi milito neniu povos venki.

El Eŭropo fariĝos dezerto, kie en la cerboj estos varmega sablo sen vivo.

Kulturoj disfalos.

Mi demandas, ĉu Esperanto povos ekzisti en tiu ĉi nova Eŭropo?

Ĉu la novkolonistojn interesos la zamenhofa lingvo?

Mi timas, ili portos por ni novan lingvon kaj novan kulturon. Ili perforte devigos al ni sian religion.

Tio estas fatala ago kontraŭ la tuta homaro. Zamenhof ne revis pri tiu ĉi estonto. Li kredis, la homo estos saĝa en la 21-a jarcento, kaj ĉiu homo vivos pace en sia patrujo. Homo ne minacas homon kaj malaperos la malamo. Diverslingvaj homoj komunikos helpe de Esperanto. Ĝi fariĝos vera pontolingvo inter landoj kaj kulturoj.

Migrantoj venas kaj venas el Afriko, Azio inundante nian kontinenton.

Oni diras, ili fuĝas de antaŭ milito. Se junuloj ĉiuj forlasas sian patrujon, kiu defendos kaj rekonstruos ilian landon.

Fuĝi de problemoj ne estas solvo. Inundi aliajn kulturojn, landojn, esperante, ke en ili trovos paradizon estas stulta afero.

Tiuj ĉi migrantoj devos reiri hejmen kaj ĉefe ili devos defendi sian landon, popolon.

Ni eŭropanoj volonte helpas, sed ne tiel.

Restu hejme kaj por vi mem konstruu pli bonan mondon, kie vi trovos vian feliĉon.

Mi proponas, helpe de Esperanto ni montru al ili la ĝustan vojon al la pli bona vivo.

Nia lingvo estas riĉa, ke ni povu klarigi al la tieaj geesperantistoj, la migrantoj elektis malbonan solvon por vivi en pli bona mondo.

-Redaktanto-



Rano kaj cikonio

-Kvak, kvak – diris la rano sur la bordo de lago – Mi devus lerni fremdan lingvon. Per mia ranolingvo mi ne povas komuniki en la mondo.

Sur la ĉielo cikonio ĵus flugis. La rano suprenrigardis, kaj tuj sciis, kiun lingvon ĝi eklernos.

-Aŭtune la cikonio flugas suden traflugante multajn landojn. Dumvoje certe ĝi devas komuniki kun fremdaj homoj. Se ĝia lingvo ne estus internacia, certe tiam ĝi ne povus komprenigi sin. La cikoniolingvo estas internacia, do mi eklernos ĝin. Post la lernado mi ne havos lingvan malfacilaĵon.

En la apudarbara librovendejo ĝi aĉetis lingvolibron, kaj diligente komencis lerni. Ĝi lernis tage kaj nokte. La aliaj ranoj mire demandadis:

-Kial vi lernas tiun ĉi lingvon?

-Amikoj, ĉu vi ne scias, en nia moderna mondo neniu rano povas ekzisti sen la scio de la cikoniolingvo. Se vi deziras fariĝi modernaj, nepre ankaŭ vi lernu ĝin. Eble morgaŭ jam estos malfrue komenci la lernadon.

-Kial ĝuste la lingvon de la cikonio? – ili demandis.

-Stultuloj, ĉu vi ne scias, cikonioj flugas suden en ĉiu aŭtuno kaj ili flugas tra multaj landoj. Ili ĉie povas komuniki per sia lingvo. Do, laŭ mi la cikoniolingvo estas internacia.

-Kiel vi deziras provi vian lingvoscion?

-Kompreneble mi iros al cikonio, kaj ni konversacios en ĝia lingvo. Baldaŭ vi vidos, kiel perfekte mi parolos tiun ĉi lingvon.

La aliaj ranoj mutiĝis kaj atendis, kio okazos.

Kiam la rano finis la lernadon, ĝi malfermis la lingvolibron kaj ĝi iris al la cikonio.

-Kion vi volas? – demandis ĝi scivole.

-Mi ellernis vian lingvon, kaj nun mi deziras konversacii kun vi.

-Bonege – venis rapide la respondo. – Sed kara amiko mi jam estas maljuna birdo. Miaj okuloj ne estas klaraj. Bonvolu veni al mi pli proksime, por ke mi bone povu vidi kaj aŭdi vin.

La rano suspektis nenion. Ĝi iris pli proksime al la cikonio. La birdo atendis nur tion. Ĝi malfermis sian longan bekon kaj tuj manĝis la ranon.

La aliaj ranoj sur la bordo de la lago diris unutone:

-Ĉu tial lerni fremdan lingvon?

-Ŝaŝa-



Poezio

Legi estas bonege. Ĉu vi legas ĉiutage? Eble ne. Vespere el via mano jam elfalas la libro. Vi estas tro laca. Prefere vi rigardas televidon. Ĉu ne? Vi rigardas senvalorajn, enuajn filmojn, kiuj dormigas vian fantazion.

La legado estas mirakla afero. La literoj, frazoj kaj la tuta libro flugigas vin al nekonata, admirinda mondo.

Do, legu ĉiutage! Malŝaltu televidilon kaj prenu libron! Mi garantias, vi havos eksterordinaran travivaĵon.



William Auld

Ebrio

la boteloj staras vice,
kamarade kaj komplace
sur la altaj murobretoj –
botelegoj, boteletoj,
verdaj, flavaj,
grasaj, kavaj,
palpebrume en la lumo
min invitas al konsumo,
gluta, tuta,
ĉes-refuta
forkonsumo de l' enhavo,
de la verdo, de la flavo,
de likvoro glate glita
svate ŝvita
kvate kvita
strate strita
streta
struta

mi rimarkas: en angulo
sidas ia ina ulo
kiu ridas ĉevaldente
kaj rikanas sento-tente,
sin ekmovas,
kison blovas,
krurojn ŝovas:
kaj mi povas
super ŝtrumpo vidi blankon,
sangomankan
gamboflankon.
mi vin amas, bela ino,

mi adoras vin sen limo,
volas tuŝi,
kune kuŝi,
kaj karesi,
kaj forgesi,
pri la griza ver' forgesi
grila priva vorgeresi
vira vorga pivaresi
vipareŝi
mi neŝeŝi
neŝeŝi
ŝuvi puvi pova-povaŝ
diri kie ŝiŝ ŝin trovaŝ
la ne
la ne-ŝe
ne-ŝeŝ
ŝeŝ
dako danto danko dankon
dankon
padonu mineŝtaŝ bria
padon'
padon'
'kon
'kon
paŭzo
naŭzo



Eŭgeno Belonenko

Demando

paper' de montaro ĉifitas...
F. G. Lorca
Montaro – ĉifita folio
Kun la skribaĵ' rivera.
Kion provkantis dio –
Diru do, aglo klera?



Aventuroj sur Luno

-Verkis: Apáti Kovács Béla-
XXI-a

-Ĉu ni malsupreniru? – ili intergardis kaj demandis.

Antaŭ ol ekparoli ili rapide ekiris. Ili preskaŭ kuris. Johano ne sciis, kien kondukas tiu ĉi ŝtuparo. Li sentis, ĝi estos bonega ideo tuj malaperi, kie oni pafadas kaj murdas unu la alian.

Kiam ili estis sufiĉe profunde, subite la pordo fermiĝis kaj ĉesis la eksteraj bruoj kaj kriegadoj.

Ili vidis nenion pro la malhelo. La onklino Izabela serĉis Johanon:



-Nevo mia, Johano, kie vi estas?

-Mi estas tie ĉi. Mi iras malsupren antaŭ vi. Sekvu min, onklino – respondis Johano.

Lia voĉo perfidis, ke li trankviliĝis iomete. Vere li ne sciis, kien ili iras, kio atendos ilin malsupre.

Neatendite Johano atingis la malsupron de la enirejo. Li serĉis pordon aŭ iun alian per siaj manoj.

Longe li serĉadis, ĝis fine siaj fingroj tuŝis ion metalan objekton. Komence li ne sciis, kio ĝi estas. Li nur esperis, ke ĝi estas la klinko de pordo. Li puŝis ĝin. Johano vidis nenion.

Li bone kalkulis, ĝi estis pordo el fero. Ĝi malrapide malfermiĝis. Ĝia grincado estis timiga. Oni aŭdas similan en hororaj filmoj. Se li pensas pri ilia stato, tiam li povas konstati, kio nun okazas al ili: mem la hororo.

-Johaĉjo – ploretis la onklino – mi sentas, kvazaŭ ni estus en kriptoj. Eble ni jam mortis kaj ni estas entombigitaj.



La humoro de la onklino Izabela subite ŝanĝiĝis. En la kosmoŝipo ŝi ridis, kvazaŭ ŝin ne interesus la estonto.

Johano ne komprenis, kio okazis. Verdire nun tio ĉi lin ne interesis. Li enpenetris ien. Ankaŭ tie ĉi estis malhelo. Li ne sciis, en kiun direkton ekiri.

Vane li demandus sian onklinon, certe ŝi ne povus helpi.

Nun necese iri kaj iri.

-Venu, malantaŭ mi! – li diris al la onklino.

-Ĉu vi vidas ion?

-Nenion. Ĉi tie estas malhelo. Almenaŭ mi vidus nur etan lumon – li respondis. – Mi ne scias, kien kondukas tiu ĉi koridoro.

-De kie vi scias, ke ĝi etas koridoro? – ekmiris Izabela.

-Certe mi ne scias. Mi nur suspektas. La muroj estas tre proksime unu al la alia. Ambaŭflanke vi povas tuŝi la murojn. Bonvolu provi!

-Vi pravas, Johaĉjo. Ĝi povas esti koridoro. Sed kien ĝi kondukas?

-Ne gravas, kien ĝi kondukas. Por ni estas bone, ke tie ĉi oni ne pafadas. Iomete ni estas en sekureco. Eble ni povos eviti la militon, kio nun estas sur la surfaco. Certe jam ĉiu mortis el la alvenintoj, aŭ nur kelkaj sukcesis saviĝi.



Ili iris senhalte. La onklino Izabela laciĝis kaj diris al Johano:

-Kara mia, ni ripozu iomete! Mi estas lacega kaj soifa. Kie ni trovos trinkaĵon? Eble ni mortos pro soifo kaj malsato. Mia akvujo jam elĉerpiĝis. Mi estas soifega – ŝi denove ekploris kaj prenis la ŝultron de sia nevo. – Ni mortos baldaŭ. Ni mortos...

-Ne timu, onklino!

Interese, en la kosmoŝipo li panikis kaj la onklino Izabela konsolis lin. Li jam ne timas, kvazaŭ li ĝuus ĉi tiun ne ĉiutagan aventuron.

Post kvinminuta ripozo ili daŭrigis la iradon en tiu ĉi mistera mondo.

Eble tia estas la morto – li pensis – por ili ĉesis la ekstera mondo. Ili vidas nenion. Ili ne vidas unu la alian. Ili nur sentas la proksimecon de la alia.

„Kie estas nun Elizabeta?” – Johano memoris neatendite pri la junulino. – „Certe ŝi atendas lin. Ĉu ŝi atendas lin?”

Longe li ne povis mediti pri tio, ĉar en la malproksimo ekbrilis la lumo de la espero.

Malgranda, pala lumo estis videbla.

-daŭrigota-



Por infanoj

La domo de la testudo



Vulpo renkontis testudon ĉe la arbara lageto. Ĝi tre ekmiris, kiam ĝi vidis, ke la testudo portas sian domon sur la dorso. Ĝi scivole demandis la testudon

-Kial vi portas vian domon kun vi?

-Antaŭ multaj jaroj, ni testudoj havis belegan palacon. Ĝi estis belega kaj ĝiaj muroj, fenestroj estis el oro. En iu tago ni ĉiuj ekskursis al la proksima rivero. Kiam ni revenis, nian palacon okupis la kolomboj. Vane ni petis, ke ili forlasu la palacon, la kolomboj nur ridis pri ni. Ili ne redonis la palacon.

Ni iris al juĝisto kaj ni plendis, la kolomboj okupis nian belegan palacon.

La juĝisto longe cerbumis, fine li venigis ankaŭ la kolombojn kaj li demandis ilin:

-Kial vi okupis la palacon de la testudoj?

-Sinjoro, juĝisto – la kolomboj diris – la testudoj neniam havis palacon. Ĉiam ni loĝis en ĝi. Kiel ili povas pruvi, ke la palaco estas la ilia. Venu kaj vidu propraokule en tiu palaco ĉie estas kolomboplumoj kaj ovoj, en kiuj estas etaj kolombidoj.

La juĝisto iris al la palaco kaj vidis, efektive en la palaco ĉie estas kolomboplumoj kaj ovoj. Nenio pruvis, ke ĝi apartenas al la testudoj.

-Fakte, nenio pravas, ke la palaco estas la via. Do, la kolomboj rajtas vivi tie.

La kolomboj devis akcepti la juĝon kaj ili serĉis alian loĝejon. Sur la kamparo ili ekvidis truon, sufiĉe komfortan.

-Ĝi estos bonega por ni – ili diris feliĉe kaj ili eniris.

Ho ve, baldaŭe la kuniklo venis hejmen kaj ĝi forpelis la testudojn. La malfeliĉuloj pluiris. Proksime de la kamparo estis monto. Tie ili ekvidis groton. Ili volis iri al ĝi, sed baldaŭe ekaperis la timiga urso.

-For de mia hejmo! Ĝi estas mia groto.

La testudoj serĉis plu la loĝejon. Sur la alta arbo ili ekvidis malplenan neston. Ili provadis iri supren, sed ĉiufoje ili falis sur la teron. Testudo ne povas grimpi sur la arbon. Ĝi ne estas birdo. Kiu deziras loĝi en la nesto, tiu havu flugilojn.

Ili tre, tre malĝojiĝis. Kie ili loĝu, se nenie ili trovas taŭgan domon.

Maljuna strigo sidis sur la branĉo de arbo kaj ĝi aŭskultis la plendon de la malgajaj testudoj. Ĝi tre kompatis ilin.

-Karuloj – ĝi komencis – se vi akceptos, mi volonte helpos al vi.

Unue la testudoj ne sciis, kiu vokis ilin. Ili mire rigardis al la strigo.

-Kiel vi povus helpi al ni? – ili demandis.

-Farigu propran domon kaj ĉiam vi portos ĝin sur via dorso.

-Kiu povus fari por ni tian domon?

-Iru al la proksima vilaĝo! Tie vivas bonkora maljunulo, kiu faros ĝin por vi.

La ideo tre plaĉis al la testudoj.

-Dankon, kara strigo! – ili diris kaj ili tuj iris al la vilaĝo.

La strigo pravis, ĉar vere la bonkora maljunulo volonte faris domon al ĉiu testudo.

Ekde tiu ĉi tago la testudoj ĉiam kunportas sian dometon sur la dorso, por ke neniu povu forrabi ĝin de ili.

-Onklo Adalberto-



PASKO

PASKO

